

Hana Košková - Poludnica el Ĉerepeŝ

Boina sidis sub malĝoja saliko en mola kaj milda aŭgusta posttagmezo kaj ekdormetis. En sia sonĝo ŝi aŭdis sian maljunan patrinon Kojĉa, la plej maljunan ciganinon en la ĉirkaŭaĵo:

- Boina, pri kio vi sonĝas? Pri pluvnuboj sidantaj sur blankaj ĉevaloj? Pri sanga bruego de hufoj?

Malbonaj sonĝoj alportas bonajn pensojn. Ne timu, ili trapikos nigran tolon per ruĝa ĝojo.

Subite ŝi ekstremis je bruego. Kvazaŭ sur ŝia fundo de cerbo iu huferus kaheksian ĉevalon.

Per salivoj ŝi viŝis siajn okulojn, ŝi forŝiris branĉeton de saliko, per nuda piedo en polvon ŝi pentris rozon, kiam ĉe ŝi abrupte ekhaltis ĉaro plennuba per flikita ŝirma tolo. Sub la tolo rigardis bukloharaj kapoj de infanoj. Ne plu la plej juna cigano desaltis el la koĉerbenko, li ordonis al mizera ĉevalo, ke ĝi la ĉaron ektiru al ombraĵo, kaj li alparolis Boinan.

- Ĉu estas al vi bone sub la saliko. Nenio turmentas vin... Sed kio mi, kun tri infanoj kaj sola. Kion mi faros? Jasmino mortis kaj nun mi devas vagi ĉirkaŭ la mondo. Kaj tiuj ĉi, nur akre kriegas kaj petas manĝaĵon.
- Ne lamentu. Vi povas ankoraŭ komenci. Vi trovos laboron. Alvenos aŭtuno, kaldronojn bezonos kamparanoj por kuiri marmeladon. Unu kaldronisto el Muĉín demandis, ĉu iu el ni laboros ĉe li.

La koro de Fako, tiel nomiĝis almigrinto, eksaltis pro ĝojo. Ŝajnis al li, ke la okuloj de la juna ciganino karesas lin, ke li tuŝas per glateta manplato ĉiun vundon, kiun li sukcesis ricevi. Li sentis kvazaŭ la manplato trairus sur frue ĝiboklinita dorso kaj direktus rekte al la koro.

- Ĉu vi donos al mi akvon? Ankaŭ infanoj soifas, ankaŭ ĉevalaĉo trinkus. Li deĉenigis sitelon el la ĉaro, de sub kusenego dismetita por la infanoj li elprenis fendetitan tason kaj li ne forgesis alrigardi ciganajn domaĉojn. Ili estis malplenaj. La domaĉoj en Ĉerepeŝ apud Fabianka ĵaŭde, kiam estis granda foiro en Luĉenec, estis sen unu animo.

Boina el la domaĉo elprenis por infanoj maldensan supon kaj flanon, pli malmolan ol haŭto sur kalkano.

- Vi ne devis. Ili jam manĝis. Bakitan maizon. Mi por ili rompadis ĝin ĉe Uderina.

Abrupte la plej maljuna filino el la infanoj de Fako elkriegis. La knabino permane batis sin sur kapo, gratvundis sian vizaĝon ĝis sango, tordiĝis kiel delirema. Al Boina ŝajnis, ke ŝiaj brakoj ŝanĝiĝis je serpentoj.

- Tie ... Tie ŝi paŝas. Sur si ŝi havas blankajn deŝiraĵojn kaj en la hararo plumojn. Miajn okulojn ŝi volas elgratvundi el kavetoj. Tiam aŭdeblis sonoradon el proksima vilaĝo. La knabino restis kuŝi en polvo sub la malĝoja saliko trankvile, kun kontenta vizaĝo. Pri ŝia lukto kun Poludnica atestis nur gratvunditaj manoj, kruroj kaj vizaĝo. La domaĉoj estis ĉirkaŭgluitaj per malhela vaporaĵo kaj per scivolemaj demandoj de Boina.

- Kion vi vidis? Diru, kio tie estis?
- Apud mi estis blanka virino. Ŝi tikis min el ĉiuj flankoj, ŝi deziris al mi diri pri via sorto en la estonteco, sed kiam sonoris sonorilo, ŝi devis foriri. Ŝi alvenos. Certe ŝi alvenos.

Novaj vizitantoj ekloĝis sub la saliko kaj Fako kun Boina interparolis per okuloj tiel mallaŭte kiel lampiroj.

- Mi restos ĉi tie. Mi konstruos dometon. Lokoj sufiĉas.

- Mi malzorgas, nur kion diras aliaj.
- Se ni vivos kune, ili diros nenion. Aŭ ĉu vi estas jam fianĉinigitaj?

- Mi estas por vi pli juna. Nu, se vi volas ...
- Mi sentas, ke vi estas el la bona mondo kaj se vi agonius de malsato, vi ebligos ankaŭ ali alia manĝi.

Baldaŭ, kiam Fako ekloĝis kun ciganetoj sur Ĉerepeŝ, kiam li instruis ĉiujn ciganinojn danci vivĝojajn dancojn kaj ankaŭ Boina al kutimiĝis al li, akurate tagmeze la knabino de Fako denove terure ekkriis, komencis ekstazi kaj gratvundis sian haŭton el sia vizaĝo.

- Tenu min, tenu. Ŝi volis min foririgi de ĉi tie, tiu, tiu. Ŝi gratvundas mian vizaĝon ĝis sango, ŝi ŝiras de mi vestaĉojn, ŝi tenas min per malvarma mano sub la gorĝo.

Rigardas Boina kaj aliaj, kiuj eliradis el la domaĉoj. Ili rigardas al knabino kun ardaĵoj okuloj kaj kun ektimita vizaĝo, kiel falas ŝia kapo en oktobra veteraĉo, kiel al ŝi nevidebla mano disŝmiras koton sur ŝiaj haroj. Sed kiam la sonorilo sonoris denove, denove ĉio senbruiĝis kaj silentis, nur flavaj folioj balanciĝis sur branĉoj de giganta malĝoja saliko.

- Morgaŭ mi iros al Kojĉa, - decidis Boina. Tuj matene ŝi eliris el Ĉerepeŝ al Holiŝe al sia avino.

Al tiu, kiu de infaneco nutris ŝin per fabeloj anstataŭ pano kaj diradis, ke cigana dio Devla viglas super ĉiu same.

Kojĉa kuŝis sur la litbenko, ŝi levis grizan kapon kun displektita harplekto. Per duonblindaj okuloj ŝi rigardis al sia nepino.

- Vi havas ĉirkaŭ via kapo nigran girlandon. Poludnica, kiu estas suĉfiksita al la knabino, kiu alvenis kun la patro al Ĉerepeŝ, ruinigis vin kaj vian infanon, kiun vi havas en ventro. Sed ne nur vin. Ĉiujn junajn ciganinojn en la ĉirkaŭaĵo.

Kiam ŝi diris tion al Boina, ŝi turnis kapon al la muro kaj jam nenion diris. La profetaĵoj de Kojĉa komencis plenumiĝi. Plej frue mortis akurate dum tagmezo bela virino de Deĵo dum nasko. Post ŝi oni entombigis infanon en nigran teron. Boina naskis nigran bukloharan knabon. Ŝiaj mamoj estis malplenaj kiel cigana poŝo antaŭ la ferioj. La knabo flaviĝis, li deziris nek sukeran akvon kaj unufoje tagmeze, kiam la knabino kriis nekompreneblajn vortojn kaj gratvundiĝitan haŭton el la vizaĝo ŝi ĉirkaŭvolvis ĉirkaŭ pordokadro de la pordo, elspiris la filo de Boina lastfoje. Koleris ĉiuj ciganinoj el Ĉerepeŝ je knabino, al kiu aliradas Poludnica. Ili decidis, ke ili ŝin forpelos el la cigana domaro. Vane Boina porpetis por ŝi, ŝi petis pardonon por la knabino. Tio ne helpis. La plej maljuna ciganino obstinis pri sia decido. Nokte ili elprenis la knabinon per hararo el ĉifona kuŝejo, ili senvestigis ŝin, la vestaĵojn ili bruligis antaŭ la domaĉo kaj ili forpelis ŝin en frostan nokton. Matene ĉevalpelistoj, kiuj veturigis terpomojn al Luĉenec, trovis la knabinon al frostigitan al herbo sur la herbejo. Ŝi havis okulojn malfermitajn plenlarĝe kaj manoj levitaj, kvazaŭ ŝi deziris iun brakumi.

Kun permeso de la aŭtorino tradukis JaVa